

Eva Suchardova: N A J A D O

Eva Suchardová atingis grandan atenton en la KONKURSO ARIEL /1954-1955/, kvankam ŝi restis malantaŭ la premiito Geraldo Mattos /Brazilo/. Ŝia plej alte taksata poemo estis la „NAJADO“.

Nur vano ia ĉirkaŭprenas min,
kaj pala nokta lun' en foliar'
dum dancas mi kun korpo de virin'
kaj efemere vagas en arbar'.

Hieraŭ stel', falinta de l'ĉiel',
ektuŝis mian ombron sur la ond'.
Mi petis ĝin pri varma sun-fabel',
sed ĝi kaŭriĝis mute, sen respond'.

Fratino eta le la fora spac',
ni same brilas nur en nokta sin',
Ĉu pro sopir' je homa viv-donac'
doloro stranga kaptas ankaŭ vin?

Aĥ, plori, ridi, ami sub la sun'
kaj idon doni al amata vir',
kaj peki, eĉ se trafos min la pun'-
ne esti sola, droni en delir' - -

La sanga, la batalanta homa kor',
kiun ne havas mi, doloras min.
Min ondo namis en noktmeza hor'
sen sento kaj amo, sen inklin'.

Aĥ, mi ne scias, kio estas larm',
kaj tamen brulas ĝi en la okul'-
neniam tuŝos min la homa varm',
karesas min ne man', sed akvo-lul'...

Nek vivos mi nek mortos kiel hom',
nur danci, kanti, ludi ĝis senfin'-,
amanta ombro nur kaj nokt-fantom'
min faris senkompatate la destin'.

ne esti sola Di', ĉu aŭdas vi?
Disŝuti varmon el homa kor',
en sango vivi, en la rid, envi',
feliĉon senti, tremi pro angor'...

Ne, mi ne kantos lule el infan',
muzikos ĉiam mi nur en malhel'.
Ne tuŝos fronton varma vira man',
nur blinda, estingita, morta stel'.

/NORDA PRISMO, 4a numero/

Praha-ek-1955-32-02

BULTENO PRAHA 32 - 1955

- 02 -

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenadas ĉiumerkrede en Praha II, Ve Smečkách 26 je la 20a horo.

Programo:

- 7.12. Jaroslav Mařík: Resuma historio de Esperanto – IIIa parto
- 14.12. 96 jaroj de nia Majstro: Solena artvespero de la Verda Ĉaro de Julio Baghy en la granda salono de Malá scéna je la 19,30a horo
- 21.12. Libera tribuno de niaj membroj
- 28.12. Klubaj, ŝtataj kaj internaciaj sukcesoj de Esperanto – Josef Vitek
- 4.1. Jaroslav Hepký: Piede al Sta Petersburgo

JUBILEULOJ EL NIAJ VICOJ

JOSEF ŘEBÍČEK 80-JARA. Nur nun ni eksciis, ke 6-an de aŭgusto festis s-ano Řebíček el Olomouc sian 80-an naskiĝtagon. La samideano, kiu laboris precipe en la fervojistaj rondoj (.... Tradukis i.a. fakan verkon „Internaciaj konvencioj při fervojaj trafikoj“) montras daŭre vivan intereson pri nia lingvo. Li akceptu nun, kvankam post festo, nian plej koran gratulon kun deziro de daŭra sano dum multaj jaroj venontaj!

-

La 30an de septembro 1955 60jariĝis nia membro, ĉiam juna kaj freŝa Jan MOLNÁR, bankoficisto, Praha XIX., Wintrova 15. Postfeste ni sendas al li niajn sincerajn salutojn kaj bondezirojn.

-

RUDOLF HROMADA 65-JARA. La 9.11.1955 atingis 65 jarojn de sia aĝo mondkonata tradukisto, verkisto kaj redaktoro esperantista Rudolf Hromada el Praha. Ĉiuj admiras lian esperantigon de ĉeĥaj kaj slovakaj literaturjuveloj kaj ĝojas pro la fakto, ke daŭre li pliriĉigas la esp. mondon per siaj vere bonegaj verkoj. Fortan sanon kaj ĉion nur bonan en la estonton!

NIAJ MORTINOJ

F-INO JINDRA ČIŽKOVSKÁ, pensista instruistino, mortis la 9-an de oktobro 1955. Kiel anino de Rondeto de esperantistinoj en Praha ŝi ĉiam fervore laboris por Esperanto. Honoron al ŝia memoro!

EKP

HONORE AL LA MAJSTRO ĈIU PLENUMU SIAN DEVON KAJ VENIGU SIAJN GEKONATOJN!
ESKTERPRAHANOJ SKRIBU AL NI POR GARANTII LA TRANOKTON! VENU A M A S E !
LEGU APARTAN INVITILON AL LA ZAMENHOFA VESPERO LA 14AN DE DEC.!

NIA BARTOŠÍK PREMIITA. Centra Dana Esperanto-Ligo anoncis konkurson por desegno de propaganda afiŝo. Ni ĝojis legie n la oktoda numero de Dansk Esperanto-Blad, ke inter la alvenintaj 9 proponoj estis unuanime elektita tiu de nia membro Dolfa Bartošík. Li ricevis la fiksitan premion kaj ni sincere gratulas.

GRANDA FILIP-VORTARO ESPERANTO-ĈEĤA aĉetota. Proponu al Emil Rybinski, Lípová 12, Praha 2 Nové město.

NIKOLAA VESPERO KAJ LABORKONFERENCO DE NIA JUNULARO

En bela salono de la palaco Fenix nia Junularo aranĝis Nikolaan vesperon la 26an de novembro. Pli ol 100 partoprenintoj esperantistaj kaj pluraj neesperantistoj ĝuis vere bonan amuzprogramon, kiu ĉiujn kontentigis per sia varieco. La programon gvidis Vl. Novobilský kaj aktorin, deklamistin aŭ kvalitan muzikon prezentis jenaj gesamideanoj: Eva Suchardová, Petr Brock, Zdeněk Čapek, Jarmila Kletečková, Jiří Knobloch, Jiří Pastor, Hana Pražáková, Eva Řiháčková, Dro Pravoslav Sádlo, Zdeněk Škvrna kaj ceteraj.

En la klasika parto estis prezentitaj Neruda, Smetana, Bach, Fibich, Ostrčil. Tre multajn donacojn evis disdoni sta Nikolao, kiu plurfoje ekzamenis la pridonacitajn gesamideanojn. En la dua parto, kiu sekvis post la programo, ĉiu dancemulo povis elprovi sian arton ĝis la 2a horo. Ni trre ĝojis vidi gastojn el tre multaj, eĉ vere malproksimaj lokoj de nia respubliko.

Dimanĉmatene en nia klubejo komencis preskaŭ kvarhora laborkonferenco, kiu estis modela, ĉar vane ne estis predita eĉ unu vorto. Plenplena salono, granda atentemo, koncizaj raportoj, absolutna disciplino estis la signoj de la konferenco. La vicprezidanto de TKKE por la Junularo s-ano Jaroslav Mařík en sia bonega raporto prezentis al la ĉeestantoj la nunan staton de nia movado kaj de la movado entute kaj skizis la linion por la proksima estonto. Raportoj de ĉiuj regionaj junular-funkciuloj donis klaran bildon pri sukcesoj aŭ malfacilaĵoj en la respektive regionoj. En posta diskuto Samuel dum la antaŭa parto de la konferenco la ĉeestantoj akiris multajn sciojn pri plibonigo de la laboro en siaj regionoj kaj speciale tiu ĉi fakto estis granda sukceso de la konferenco. Ni gratulas al nia Junularo pro la perfekte farita laboro!

EKP

NIA GRANDA VENKO EN OLOMOUC

Du plej belaj arioj kaj du plej belaj duetoj jel nia mondfama opero de B. Smetana „LA VENDITA FIANĈINO“ aperas en Esperanto. Dank'al s-ano Zdeněk Švehla, tenora operkantisto, s-anino Dr-ino Královcová, soprkantistino kaj s-ano Fr. Panoš, pianvirtuozo ĉiuj membroj de la opero en Olomouc, aperas du gramofondiskoj kun niaj juvelmelodioj. La diskoj estas dediĉitaj al Esperanto-fako de Radio Roma kaj UNESCO okaze de la unua jubileo de historia rezolucio poresperanta. Proponu la gramofondiskojn al viaj eksterlandaj geamikoj kaj mendu ilin ĉe la sekretario de TKKE s-ano Miloš Rudolf Wanklova 14 Olomouc. Gratulon kaj dankon koregan ni ĉiuj adresu al niaj bravaj Olomoucoj!

MILOŠ LUKÁŠ DENOVE AKTIVA. La Ŝtata lingva instituto ĉe la Ekonomia lernejo en Hradec Králové aranĝas Esperanto-kurson, al kiu aliĝis 20 personoj. La unua leciono okazis la 3-an de novembro, la sekvaj lecionoj ĉiuj aŭde je la 18-a horo en Ekonomia lernejo. Instruas prof. Miloš Lukáš, pri kiu ni sufiĉe longe nenion aŭdis. Miloš Lukáš prelegos por nia klubo la 4an de aprilo – temo: „Kiel helpis min Esperanto dum mia preskaŭ duonjarcenta praktikado de ĝi“. Ni jam antaŭĝojas denove aŭdi lin!

ĈU ESPERANTO UTILAS? Ni respondas per mallonga raporto el nia laborejo pri kelkaj lastsemajnaj okazintaĵoj: Ni vizitis ĉefredaktoron de Literární noviny Jan Pilař, al kiu ni prezentis ĉinajn tradukojn de liaj poemoj kaj klarigis samtempe la rolon de Esperanto en tiu ĉi kaj aliaj tradukoj el ĉeĥoslovaka literaturo. /Verŝajna sekvo estis favora artikolo en venonta numero de Literární noviny./

- Ni ricevis el Jugoslavio kompletan liston de kreaĵaj Bezruč-tradukoj. Preskaŭ ĉiuj manka sen la granda Bezruč-bibliografio, eldonita de Slezský studijní ústav. - Ni kolektis /kaj publikigos/ detalojn pri polemiko, kiu okazi sen Esperanto en 1901 inter S. K. Neumann kaj Dostál-Lutinov. - Ni trovis, ke nia Akademio de Sciencoj senutile faras planon por livero de ampleksa materialo al japana enciklopedio estas preparata. - Ni donis informon al Jugoslavio pri malofta slovena libro el 1672, havebla en Praha. - Al Vietnamo ni sendis tradukojn el ĉeĥa literaturo. - Al Universitata biblioteko en Praha ni liveris novajn indikojn por preparata bibliografio de elĉeĥaj tradukoj. - Al slovakia komisiono, esperanta laboron de Gregor-Tajovský ni donis plurajn informojn. - Tiel parolu al neinformitoj kaj dubantoj kaj vi alprosimigos nian venkon!

Někteří naši členové pravidelně dostávají Bulteno a dosud nezaplatili své příspěvky. Jiní – nečlenové – zase nám píší, abychom jim Bulteno posílali. Nuže! Bulteno je určeno především členům našeho klubu, proto obnovte včas své členství nebo se staňte členem naší velké mírové rodiny. Příspěvky: řádný člen Kčs 24,--, rodinný člen Kčs 8,--, nevýdělečná mládež a voj. Kčs 10,--.
Vyžádejte si přihlášku a složenku u sam. Anči Bárochové, Sokolská 17, Praha II.
Předem vítáme vaše pochopení a podporu naší činnosti.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ 1907-1914 /ĉio, kio aperis/, sen literatura aldono, por Kčs 22,-- afrankite. Mendu rapide, en okazo de liverebleco vi ricevos nian pagilon.

KON-TIKI en slovakia lingvo estas ne nur streĉa vojaĝlibro pri plej interesaj aventuroj kaj kun ekstreme instrua ohavo sed ankaŭ bonega propagandilo en mano de ĉiu esperantisto. Ĝi enhavas ripetan mencion, ke ĝi estis tradukita el Esperanto. Ni rekomendas varme ĝian aĉeton. Al ĉiu interesuj ni liveras binditan ekzempleron por 23 Kčs. Postulu nian pagilon, per kiu faru la mendon. Laŭ nia lasta informo ĉe Slovenská kniha en Praha la libro estas momente disvendita.

!!
LA INSIGNOJ! Verda stelo sur blanka fono. Ladaj, simplaj, sed belaj po Kčs 2 aŭ 10 ekz. Kčs 16 afrankite. Post antaŭa pago liveros J. Šustr, Dlouhá 10, Praha I.
!!

LITERÁRNÍ NOVINY fine atentis Esperanton. Nun denove ĝia 47-a numero alportas informon pri la ĉina poemlibro „Septembro kaj aliaj poemoj“ kaj mencias, ke ĝin preparis Jang Thie-ing laŭ Esperanto-teksto. Kiel ni aliloke jam mencias, enestas poemoj de Neumann, Biebl, Pujmanová, Pilař kaj Hlbina. Tuta kultura mondo ĉeĥoslovaka ekscias ĉi tiel pri la tasko, kiun sukcese plenumas Esperanto. Ni ĝoju pri la fakto, tamen ni nepre kaj neniel volas rekomendi, ke vi nun amase skribu al Literární noviny laŭdante kaj dankante ĝin!

ĈEĤOSLOVAKIO PER INFANAJ OKULOJ. Nur 10 ĉeĥoslovakaj samideanoj sekvis nian ripetan alvokon kaj sendis sian kontribuon al ĉeĥoslovaka parto de japana verko, kies enhavon klarigas la supra titolo. Eldonejo Heibonša en Tokio petas de ni tamen 1000 kontribuajojn. Instruistoj, gepatroj kaj ĉiu, kiu rilatas kun infanoj, postulu tuj senpagan informilon de s-ano Ota Ginz, Nad cementárnou 10, Praha-Podolí.

GAZETA SERVO. Kun plezuro ni anoncas, ke ni dcidiĝis renovigi la ĉeĥoslovakian Gazetan Servon, ku en la pasintaj jaroj laŭ opinioj de komeptentuloj alportis nemezureblan silon al nia Esperanto-movado kaj al kiu ni devas dani por ĝia iama forteco. Konforme al la cirkonstancoj, la renovigo okazas provizore sole ne plej modestaj limoj. Ni faras la unuan paŝon: ni kolektas, prilaboras kaj registras ĉion, kion represas la ĉeĥoslovaka gazetaro koncerne lingvon internacian. Sendu al ni ĉiun eĉ plej etan mencion, kiun vi trovas kaj notu /se vi ne sendas kompletan numeron/ nomon kaj aperdaton de la gazeto. Kun ĝojo ni salutas la unuan kunlaboranton de Gazeta servo s-anon J. Forman en Praha, kiu akceptis la taskon ĝin administri.

ĈU ESPERANTO UTILAS? Pri tio fari s-ano Stanislav Čáp en Kroměříž provon, kiu brilo sukcesis. En sukerfabrikejo, kies oficisto li estas, estis granda telefona centrem, kiu ne volis funkcii. Lokaj fakuloj ĝin neniel povis ripari. S-ano Čáp legis sur la centrem la ŝildon de la sveda „Ericsson“, kiu ĝin konstruis kaj li skribis tu jal sveda fakulo s-ano Sten Ofers en Johanneshov, kie adreson li trovis en UEA-Jarlibro. Ofers prizorgis de „ERICSSON“ detalan priskribon de la centrem kun kompleta Samaro, laŭ kiu la elektristoj en Kroměříž rapide kaj facile ekfunkciigis la maŝinon. Kaj nun la skerfabrikejo de Kroměříž vigle telefonas kun ĉiuj branĉoj de la granda fabriko – danke al Esperanto.

STENOGRAFIO KAJ ESPERANTO. Oficiala organo de ĉeĥoslovakaj stenografiistoj „Těsnopisné rozhledy“ alportas en sia nro B/1 de la 15-a oktobro informon pri internaciaj renkontoj de stenografiistoj en Svisio kaj en Monako. Aldonita estas noto, ke la sciigojn tradukis Ad. Staňura el la Esperanto-revuo „Fluganta skribilo“.

ĈIU VENU la 14an de decembro je la 19.30-a horo en grandan salonon de nia klubdomo por admirinian VERDAN ĈARON DE JULIO BAGHY honore al la Majstro. Venigu viajn gekonatojn! Ĉeestos la estraro de Osvětová beseda.

ESPERANTO HELPIS EN SCIENCA VERKO. Nur nun venis en niajn manojn la granda Bezruč-bibliografio, aperinta en 1953 /Viktor Ficek-Alois Kučík: Bibliografie Petra Bezruče/ kaj ni trovis tie detalajn indikojn pri multajn tradukoj, kiuj aperis en Esperanto kaj en aliaj lingvoj /japana, ĉina/ per helpo de Esperanto. Ni konvinkigis, kiel amplekse kunlaboris esperantistoj por konatigo de Bezruč-verko tra la mondo. La fakto, ke ni kunlaboris efike ankaŭ pri tiu ĉi bibliografio, ne estas tamen menciita kaj la aŭtoroj ne trovis utile liveri al ni tiun verkon. Ni nota sunu eraron en la Esperanto – fako: Estas tie notita kiel verko de Bezruč la poemo „En skeptika horo“, aperinta en Ligilo nro 2/1939 Temas pri Esp.originalaĵo de T. Pumpr.

DJIOU JŮ JŮ SUČ THA /Septembro kaj aliaj poemoj/ estas nova libro, kiu aperis en Ĉinio per helpo de Esperanto. Jang Tin-ieh-ing preparis tiun ĉi poemkolekton, en kiun li enmetis tri poemou de S. K. Neumann, 2 poemojn de Marie Pujmanová, 3 poemojn de Konstantin Biebl, 2 poemojn de Jan Pilař kaj unu poemon de Pavol Hlbina. Ĉiuj tradukoj estis faritaj laŭ esp.tekstoj, liveritaj al nia ĉina amiko.

LITERÁRNÍ NOVINY PRI ESPERANTO. Tiu ĉi graveja gazeto kiu ĉiam evitis mencion pri Esperanto, alportas en sia 42-a nro de 15. 10. 1955 artikolon pri E. traduko de „Sinjoro Tadeo“ kaj pri fondo de Esperanto-Asocio en ĈSSR. Unu el la gravaj bastionoj falis. Ni esperu, ke la venko baldaŭ estos nia.

VERDA ĈARO DE JULILO BAGHY, kiu informiĝis ĉe nia klubo kaj akiris merititan famon, ricevis leteron de la Esperanto-estrado „Flamo“ en Sofia. La bulgaraj samideanoj volas interŝanĝi spertojn kun nia artista kolektivo.

URBESTRO DE BOLOGNA – KOMUNISTO. Septembra „Pacdefendanto“ informas, ke Guisepppe Dozzi, urbestro de Bologna, kiu salutis la 40-an Universalan Kongreson en perfekta Esperanto kaj kiu montris ankaŭ en multaj aliaj rilatoj sian altan ŝaton al afero de Esperanto, estas komunisto.

ESPERANTO EN UNIVERSITATOJ. La 3-an de oktobro estis solene malfermita nova studjaro de Esperanto en la universitato „Kliment Oĥridski“ en Sofia. Anoncis sin 65 studentoj, kiujn instruas prof. Stojan Ĝuĝev. Tiu ĉi profesoro estas ankaŭ estro de la Esperanto-katedro ĉe la universitato. Membroj de tiu katedro estas deko da profesoroj, docentoj kaj asistentoj en Sofia. Ŝtata Jagiellona Universitato en Krakovo komencis instrui Esperanton la 14-an de oktobro al 52 studentoj de diversaj fakultatoj. Instruas profesoro Miczyslaw Sigmarski.

KANTOJ DE LA PACO, poemaro originae verkita de Canko Murgin, Sofia 1955. 15 pĝ 15x20 cm. Pura multobligajo. Prezo 2,50 Kĉs afrankite. Ĉiu posedu kaj disvastigu la aktualajn poemou de la entuziasma bulgara samideano.

LABORISTA ESPERANTISTO AMSTERDAM parola sen sia augusta numero vaste kaj simpatie pri la ĉehoslovaka Esp-movado, citante ankaŭ nian Bultenon.

ESPERANTOLOGIO. Aperis 4-a nro de tiu ĉi revue kaj estis ekspedita al nia lando, sed la ekspedita kvanto ne estas nun trovebla. Ni esperas, ke nia esploro estas sukcesa kaj tiam ni liveros la kapron al ĉiuj abonintoj. Estas la lasta kajero de la unua antaŭpagita volumo. La eldonisto intencas daŭrigi la eldonon, sed ni dubas, ke ni sukcesos aboni ĝin. La ŝtata importkompanio ne akceptas mendojn por okcidentlandaj eldonaĵoj.

ESPERANTO-VIVO EN SOVETUNIO...ĉiam plivigliĝas. En Moskva funkcias kelkaj Esp.rondetoj, inter ili la rondeto ĉe Lingvosciencia. Instituto de Sciencia Akademio, kiun gvidas prof. Martinskaja kaj ĉe Lomonosov-Universitato, gvidata de F. Bokarev – laŭ lia nova informletero.

E. Nikiforova el Moskva dankas al ĉiuj skribintoj, sed bedaŭras, ke ŝi ne povas respondi pro manko da tempo. Ŝi neniel intencis korespondi kaj ŝia adreso aperis en iu gazeto publike pro eraro.

AŬSKULTU SVISAN RADION sur ondo 48,66m kaj 31,46m ĉiun mardon /A. Baur/ kaj ĵaŭdon /E. Privat/ je 12,55 h kaj 18,35 h. Vi aŭdos bonegan Esperanton el buŝo de la supre notitaj samideanoj...kaj ne forgesu vian aŭskulton konfirmi al la adreso: Svisa Servo de Kurtondoj, Neuengasse 23, Bern.

RENKONTIĜO KUN POLAJ SAMIDEANOJ SUR MONTO SNĚŽKA en Krkonoše okazis la 10-an de julio. Esp.rondeto el Náchod kaj kvar polaj samideanoj el Jelenia Gora kaj el Wroclaw kunvenis sur plej alta monto de Bohemio, kuŝanta sur ĉeĥa-pola landlimo. Belaj fotobildetoj, kiujn ni ricevis konvinkigas nin pri sincera samideana atmosfero de tiu renkontiĝo.

KIU KONAS D-RON KAREL HRBEK? Dum nuna junio pasigis ĉeĥa samideano dro Karel Hrbek 11 tagojn en Tokio. Li ekriatiĝis kun japanaj esperantistoj, inter ili ankaŭ kun malnova amiko de ĉeĥa popolo Aitaro Yamanoj, scianta paroli ĉeĥan lingvon. – Tion ĉi ni eksciis el augusta numero de LA REVUO ORIENTA, deĉifrinte malfacile japanan tekston de koncerna artikolo. Ni direktats, du petojn: 1-an al la estimata redakcio de La Revuo Orienta en Tokio, ke ĝi tiel interesajn artikolojn publikigu laŭeble en Esperanto, kiun ne-japanaj esperantitoj regas pli bone ol lingvon japanan, 2-an al esperantistoj ĉeĥoslovakaj, ke ili helpu al ni trovi s-anon Hrbek.

INTERŜANĜO DE POŝTMARKOJ kun eksterlando ne estis ĝis nun permesita, kiel ni ripete atentigis, kaj ĝi estis punata. La ministerio por eksterlanda komerco nun donis tiun premeson ekde la 17-a de septembro nunjara, sed devas esti severe observataj la kondiĉoj. Detalojn petu de oficiala filatelista rondo, kies membro vi devas esti, se vi deziras fari interŝanĝojn.

LIBROSENDOJ EN EKSTERLANDON sen eksportpermeso estas permesitaj ĝis 100 Kčs laŭ la bultena sciigo nro 62 de la ministerio por eksterl.komerco. Temas pri libroj normale eldonataj kaj libere aĉeteblaj en librovendejoj. Malpermesita estas faka literaturo aŭ literaturo specialaj celoj.

PRI HUNGARAJ SPORTISTOJ, kiu vizitis la urbon Praha, parolas entuziasme „Večerní Praha“ de 3-a de oktobro kaj laŭdas ankaŭ la „bonan“ interkompreniĝon. La gazeto citas ekzemplojn de la uzita abomena lingvokomisaĵo kaj nomas ĝin „slava-germana-hungara Esperanto“. La redakcio konsideras ĝin sufiĉa por ekesto de vera amikeco. Ni estas de alia opinio.

NI KORE DANKAS: Donacojn de ciklostila papero ni ricevis de s-anoj: Vítovec, Vodňany, Ambrož Brno, Koral Volyně. Grandan kvanton da papero ebligis al ni aĉeti E. M. el K. Per mondonaco subtenis eldonadon de nia Bulteno: D-ro Ratay Praha Kčs 11, Ungrová Neratovice 26,-, Míčová Praha 6,- kaj 26,-, Rybín Partyzánska Lupča 6,-, Ph.Mr. Jordán Ružomberok 6,-, Raška Klimkovice 20,-, s-anino M. el K. 32,50, Werner Brno 6,- kaj 16,-, prof. Filip Velíš 8,- kaj 9,25, Fučková Val.Klobouky 52,-, Kutik Pardubice 10,-, Bílý Praha 6,-, Štencová Jilemnice 16,-, Vesecká Praha 10,-, Šumavanská Praha 12,-.

Laŭbezzone eldonas Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2.

Pri la enhavo respondecas: Josef Vítek, Jungmannova 24, Praha II.

Bulteno – koresponda adreso: Jaroslav Š u s t r, Dlouhá tř. 10, Praha I.

VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY

i n v i t a s v i n ...

„--- por momento revoku en vian memoron bildon, kiu montras tiun periodon de via nacia lingvo, kiam ĝi ankoraŭ fortostreĉe devis batali por sia egalrajteco en la teatroarto. Tute certe vi konstatos ke tiuj trupetoj, vagantaj disen de urbo al vilaĝo, de vilaĝo al urbeto por prezenti spektaklojn ofte en veturilejoj, havis grandan destinon por triumfigi la nacian lingvon kaj ĝian dramatan literaturon. Ilia sinofera entuziasmo vekis intereson de la indiferenta publiko pri tio, kio fakte apartenis al la lingva komuno kaj pri kio oni eĉ ne atentis ĝis la apero de la unuaj trupoj teatraj, kie persista laboro faris kaj eĉ nun faras netakseblan servon al la disvastiĝo, evoluo kaj floriĝo de via drama literaturo ĝenerale kaj al beletrista kristaliĝo de via nacia lingvo ĝenerale.

Nu, tian taskon devus havi ankaŭ teatra trupo en nia lingva movado. La efektivigo de la Esperanto – teatroarto kompletigos tiun laboron, kiu iam alportas faktan sukceson de nia lingvo por nova kulturo. Por tia pionira agado mi opinias la „Verdan ĉaron“ tre taŭga. Certe ĝi jam venkis la malfacilon de la komenco; nun devas daŭrigi plua sistema arta evoluto ---

--- ankoraŭ unu peton mi havas a lvi. Mi proponas al vi, ke la 14-an de decembro, okaze de la Zamenhof-a festeno deklamu kiel prologon la 75-an poemon el mia „La vagabondo kantas“. Ĝi temas pri li kaj pri nia afero citante la ses unuajn versojn de liaj ses poemoj originalaj---“

Jen parto el la letero de nia spirita
patro kaj instiganto, Julio B a g h y.

PROGRAMO DE LA ARTA VESPERO DE LA „VERDA ĈARO DE J. BAGHY“

La 14-an de decembro – 19,30-a horo Granda salono de la klubdomo.

Malá scéna – Ve Smečkách 26, Praha II.

Prologo: la 75-a poemo el la kolekto

„La vagabondo kantas“
/Julio Baghy/

H. Sudermann: LA HEJMO

Laŭ la origina dramo reverkis kaj
esperantigis A. Seemann

P a ŭ z o

K.H.Borovský: BAPTO DE CARO VLADIMIRO
/trad.Tomáš Pumpr/
Julio Baghy: NI DEKSEJARAĴ
NI SEPDEKJARAĴ

Karel Čapek: PATRINO

muntaĵo el la dramo, tradukis Rudolf
Hromada

--